Österreichische Nationalbibliothek
Zeitschriftensaal

AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la austria Esperanto-movado
Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung

Aperas monate

Redakcio kaj administracio: Vieno I., Neutorgasse 9, Austrio. — Telefono U 29-500

NRO 3-4
4-a JARO
MARTO-APRILO 1949

EL LA ENHAVO:

Mondlingva problemo en la universitato de Vieno

Sub la stelĉielo

Aŭstria Esperanto-Kongreso 1949 en Graz

Aŭstria Esperanto-poŝtmarko

La Esperanto-movado en Aŭstrio

Informoj de la Laborista Esperantistaro

Katolika Esperanta Vivo

Bibliografio

LASTA INFORMO:

Generalpoŝtdirektoro D-ro Karl D w o r s c h a k persone parolos la 21. 5. 1949 ĉe la radiosendilo Wien I je la 19.30 h. germane kaj parte en Esperanto pri la eldono de la aŭstria Esperanto-poŝtmarko, aperonta la 1. Junio 1949.

AUSTRIA ESPERANTO-REVUO oficiala organo
de Austria Esperantista Federacio kaj de Austria Esperanto-Instituto
Adreso: Wien I., Neutorgasse 9, Austrio
Abonprezo: Jarabono aŭstr. ŝil. 24.— aŭ egalvaloro.
Por membroj de AEF senpage.

KORESPONDADO

Kiu volas korespondi kun en- kaj eksterlandaj geesperantistoj, sendu sian korespondpeton al la redakcio de AER. Ni publikigos ĝin laŭ la disponebla loko.

Unua korespondanonceto dulinia por AEF-anoj senpaga. Plua anonceto kaj por aliaj personoj kostas ŝil. 4,—. Ni petas, skribu bone legeble!

Mallongigoj: L = leteroj; PK = poŝtkarto; PM = poŝtmarko.

Aŭstrio. — S-ino Christine Steinmassl, Salzburg, Ignaz Harrerstr. 15, 48 j., dez. kor. kun s-an(in)o el Svislando.

S-ro Michael Paseka, Blumengasse 13, Sauerbrunn, Bgld., E-kursgvidanto, serĉas por siaj kursanoj interŝ. de il. PK kaj L kun tutmondo. Resp. garantiata.

E-kursanoj dez. kor. kun ĉiuj landoj. Adreso: Volksbildungshaus Vieno V., Stöbergasse 11, Esperantokurso.

Ĉekoslovakujo. — S-ro Joe Motlíček, Drahotuše 57, kor. kaj interŝanĝas PM. Certe respondos.

Germanujo. — S-rino Ruth Frey, 28 j., (13 b) Memmingen (Allgäu), Hohenzollernstr. 8, kor. kun aŭstria aŭ alilanda s-anino.

S-ro Wilhelm Otte, prof. de muziko, (20 b) Holzminden, An den Teichen 17, kor. kun s-an(in)oj ĉiulande pri diversaj temoj.

Japanujo. — S-ro Sugimoto Hakaru, Hamadera — Motomati 5-578 Sakai-si, Oosaka-hu, gimnazia instruisto 30 j., kor. pri socia scienco, nacia vivo, eduko, matematiko kaj aliaj temoj.

Gelernantoj inter 17—20 j., ĉ i u j loĝantai en Abeno — Kotogakko Kitabatake Abeno-ku, Oosaka-si, kor., interŝ. bildkartojn, PM. gazetojn kun samaĝuloj; iliaj nomoj estas: s-ro Nagasu-Kazuyuki; s-ro Hanatani-Ken; s-ro Oonisi-Akira; s-ro Huzimoto-Tosiaki; s-ro Kitahara-Atuyuki; s-ro Simizu-Tosio; s-ro Yasuda-Takatugu; f-ino Uemura-Hisako; f-ino Eniti-Sadako.

Bulgarujo. — S-ro Stamo Dimitrov, studento, ul. Mamarĉev 3, Plovdiv, interŝanĝas specimenojn de komercaĵoj kontraŭ belegaj bulgaraj eksportobjektoj. Ankaŭ neuzitaj PM-novaĵoj. Alsendado garantiata.

Bolivia. — Esperanto-Centro, Av. 20 de Octubre, 365, La Paz, aranĝos leter-vesperon kaj petas pri alsendo de multaj L kaj PK el tutmondo.

S-ro Miroslav Filka, 26 j. oficisto, Stojanova 6/III, Brno, kor. kun samideanino el Aŭstrio.

S-ro Milan Selbicky, en Kovaĉ p. Konecchlumi, studento de reala lernejo kor. kun aŭstria s-ano kaj interŝ. PM., gazetojn; scias franc. kaj germanan lingvojn.

Danlando. — S-ro Borge Andersen, Teglvaerksalle 11, Aalborg, serĉas kontakton kun aŭstriaj esp-istaj filatelistoj.

Francujo. — Kelkaj 13 — 16 j. novaj esp-istoj dez. kor. kun samaĝaj aŭstriaj ges-anoj. Skribu unue al: Claude Branchu, Lycée David D'Angers, ANGERS, Saine et Loire. Mi parte dez. skribi ankaŭ germane.

S-ro J. Preining, Schönegg 8, Vorder-Weissenbach, Mühlviertel, interŝ. PM kaj il. PK kun tutmondo. Respondo garantiata.

AŬSTRIA
ESPERANTO-REVUO

4-a jaro | MARTO/APRILO 1949 | n-ro 3—4

Mondlingva problemo diskutata en la universitato de Vieno

La prezidanto de la Viena Lingva Societo (Wiener Sprachgesellschaft), universitata prof. d-ro W. Havers, okazigis en la kadro de la Hindogermana Instituto de la Universitato de Vieno du vesperojn, dediĉitajn al la mondlingva problemo. La unuaj paroladoj okazis la 10. 1. 1949 antaŭ multnombra auskultantaro.

Universitata docento d-ro A. Sieberer enkondukis la paroladojn starigante la principan demandon, ĉu la moderna vivo kun siaj multflankaj internaciaj rilatoj fakte bezonas m o n d lingvon. Li senrezerve jesis la bezonon de lingvo internacia kaj diris, ke eĉ tiuj, kiuj neas la ĝisnunajn projektojn, sentas la neceson krei mondlingvon. La referanto skizis la provojn deklari unu el la kulturlingvoj k o m u n a lingvo kaj diris, ke eĉ agnosko de pluraj naciaj lingvoj kiel lingvoj internaciaj estus solvo de la problemo, sed tio postulus de la uzantoj tro grandajn spiritajn strecĉojn. La estonta mondlingvo ankaŭ devas esti a n a l i z a lingvo kiel la kulturlingvoj. Aliaj konsideroj estas, ĉu nur relative malvasta rondo de kleruloj apliku ĉi tiun lingvon aŭ ĉu ĝi estu ankaŭ ĝenerale parolata de la grandaj popolaj amasoj; ĉu estu kreota aparta lingvo komuna por la landoj de la tielnomitaj okcidenta kaj orienta blokoj? Oni eĉ povus imagi, ke tri universalaj lingvoj estus penseblaj kaj nome por la okcidenta, slava kaj azia sferoj. D-ro Sieberer opinias, ke ankoraŭ fundaj studoj necesas por solvi definitive la mondlingvan problemon, ĉar la lingva multeco devenas laŭ la legendo de la babilona konfuzo de la lingvoj, dum ni pro la multo de a r t e f a r i t a j lingvoj povas paroli pri nova babilono de mondlingvoj.

La referanto opinias, por eviti senplanan aplikadon de mondlingva projekto, la plej taŭga el la multaj projektoj devus esti aprobita de IALA kaj poste oficiale agnoskata de UNESCO kaj registaroj, fine enkondukata ĉiulande en la lernejojn kaj per tio poste ĝin lernos kaj parolos la popoloj en tutmondo.

Universitata prof. d-ro H. Sirk faris paroladon pri la historio de la mondlingva movado kaj elmontris, ke malgraŭ la multaj lingvo-

projektoj kiel Volapük, Occidental kaj diversaj aliaj nur Esperanto sola restis lingvo internacia vere parolata kaj uzata de multaj miloj en ĉiuj kontinentoj.

Kortega konsilanto d-ro F. Wollmann, la fondinto kaj iama direktoro de la ŝtata ekzamenkomisiono por Esperanto, parolis pri Esperanto, klarigante ĝiajn strukturon, simplecon de la gramatiko, facilan lerneblecon kaj elprovon en la literaturo, tekniko, scienco, radio kaj ĉiutaga praktika vivo ĉiulande.

La aŭskultantaro dankis al la referintoj per multa aplaŭdo. La daŭrigo de la paroladoj okazis la 17. 1. 1949 en la sama salono universitata.

D-ro H. Homolka pledis por Occidental kiel la plej perfekta mondlingva projekto kaj diris, ke ĉi tiu movado per objektivaj argumentoj batalas kontraŭ fanatismo kaj politikaj strebadoj. Occidental nur en 1906 estis konigata al pli vasta publiko, tial Esperanto havis jam en la propagando tempogajnon de pli ol 25 jaroj. La lingvo estas konstruita por ĉiuj celoj, dum en Esperanto regas timo pro la neologismoj, krome Occidental estas pli facile lernebla. Per laŭtlegado de longa teksto en Occidental la referanto donis provon pri la lingvo mem. Tamen li ne raportis pri tio, kie Occidental fakte estas parolata kaj kiom da homoj ĝin praktike jam uzas.

Universal-Latino estas nova lingvoprojekto, pri kiu parolis s-ro K. Pötzl. La malsimplan gramatikon de la latina lingvo li opinias povi plifaciligi per diversaj aliigoj de la vortfinaĵoj. Sed liaj koncizaj lingvoargumentoj evidente ne povis trovi la intereson de la aŭskultantaro kaj eĉ estis moke priridetitaj de la ĉeestantaj latinuloj.

Poste parolis reprezentanto de la tielnomita Buri-lingvo (de Eugen Burian el Ischl, Aŭstrio). Li diris, ke ĉiuj projektoj de mondlingvoj devas esti lernataj kaj tio por la homoj ĝenerale ne estas oportuna. La Buri-sistemon oni ne bezonas lerni; en ĉi tiu sistemo sufiĉus scii mil normvortojn, kiuj estas egalsencaj en ĉiuj lingvoj kaj per tio oni facile povus interkompreniĝi. Ekzemple la dua germana vorto por la termino ĉevalo nomiĝas Ross (ros). Kiam en ĉiuj lingvoj estus aplikata la vorto „ros" apud la nacia termino por ĉevalo, ĉiuj fremdlingvanoj komprenus la signifon de la vorto. (Laŭ la prezentado ĉi tiu sistemo devas esti sufiĉe diletanta kaj ne povas esti serioze konsiderata kiel mondlingva projekto.)

Universitata asistanto d-ro K. Ammer en sia parolado diris, ke la problemo estas, ĉu enkonduki unu mondlingvon por ĉiuj homoj aŭ por ĉiu kultursfero apartan planlingvon. Por krei veran mondlingvon, oni devas konsideri okcidentan kaj orientan kultursferojn. Fakto estas, ke ĉiu lingvo kvazaŭ estas artefarita lingvo, pro tio la kreado kaj enkonduko de planlingvo certe estas ebla. Oni devas nur trovi la

ĝustan lingvoformon. Lingvoj devas esti lernataj, tial ĉiu planlingvo devas esti facile lernebla kaj havi relative nur malgrandan vorttrezoron. La malfacileco kuŝas en la fonetiko, tial ekz. Basic English n e povus fariĝi mondlingvo. Ankaŭ estas grave atenti la morfologion de lingvo. Malfacila en Esperanto ekzemple estas la akuzativo, kiun oni devus eviti. Sed bona en Esperanto estas la aplikado de prefiksoj kaj sufiksoj por formado de novaj vortoj. Occidental havas malfacilaĵojn en la skribo, tial ĝi povus servi kiel mondlingvo nur en la romana kultursfero.

Pro kelkaj ampleksaj referatoj ne restis multe da tempo por la intencita diskutado pri la proponitaj lingvosistemoj. Tial nur koncize respondis prof. Sirk, kortega kons. d-ro Wollmann, d-ro Grimme, kalkulkonsilanto R. M. Frey kaj kelkaj aliaj. Unu el la aŭskultantaro trafe diris, ke la mondo ne povas atendi ĝis la lingvosciencistoj post 200 jaroj eble solvos la problemon de mondlingvo, la praktika vivo ĝin postulas jam nun.

Poste proponis d-ro Sieberer okazigi trian vesperon en Marto por paroli pri Basic English kaj daŭrigi la diskuton, kio akceptiĝis.

A. B.

Nia honor-prezidanto d-ro K. Dworschak

La pasintjara Aŭstria Esperanto-Kongreso en Linz unuanime elektis la ĝeneral-direktoron de la aŭstria ŝtata poŝtadministracio, s-ron sekcia ĉefo d-ro Karl D w o r s c h a k Honora-Prezidanto de AEF.

Li naskiĝis la 24. 10. 1903 en Krakovo, en nuna Polujo, kiel filo de aŭstria kolonelo. Siajn studadojn li faris en Praha, Agram kaj Wien. Kiel doktoro jur. li venis en la servon de la aŭstria poŝto kiel oficisto la 28. 2. 1927 kaj oni baldaŭ ŝatis en la administracio liajn fakajn konojn.

Venis la fatala Marto 1938, kiam la germanaj naciistoj perforte okupis Aŭstrion. Kiel konata kontraŭulo de la nazi-reĝimo, d-ro K. Dworschak estis arestita de la Gestapo jam la 11. 3. 1938 kaj sekve de tio li estis maldungita el la ŝtata servo sen pensio. Post sia eksigo el la malliberejo li trovis okupon kiel simpla helpoficisto en granda industria entrepreno. Sed baldaŭ oni ekkonis liajn fakajn kvalitojn kaj li fariĝis estro de grava sekcio en tiu entrepreno.

Sed kiam en 1945 Aŭstrio estis liberigata de la aliancanoj, d-ro K. Dworschak tuj metis sin je la dispono al la aŭstria poŝto kaj la provizora registaro la 14. 4. 1945 eknomis lin ĝenerala direktoro de la aŭstria poŝt-administracio kaj komisiis lin rekonstrui la tute detruitan poŝtadministracion, kiun taskon d-ro K. Dworschak komencis per sperto kaj energio. Li ne estas burokrato laŭ la kutima senco, sed homo de la

praktika vivo kaj la spertojn kolektitajn dum sia okupo en la industrio, li nun utile aplikas en la ŝtata administracio. Tial li post relative mallonga tempo sukcesis reorganizi la tutan poŝtadministracion, tiel ke ĝi jam povus funkcii normale, se la administracia aparato ne multe estus malhelpata pro la ĉeesto kaj diversaj ordonoj de la aliancanoj.

Kiel homo progresema, la aŭstria ĝenerala poŝtdirektoro tuj perceptis la gravan rolon de lingvo internacia kiam nia malnova kaj senlaca Esperanto-pioniro, kalkul-konsilisto Rudolf M. F r e y, antaŭ du jaroj entreprenis la gravan paŝon, konvinki d-ron K. Dworschak pri la praktika taŭgeco de Esperanto en la poŝtadministracioj ne nur en Aŭstrio, sed en tutmondo.

De tiu tempo d-ro K. Dworschak estas varma amiko al Esperanto, kiun li favoras en sia altranga posteno laŭpove. Tial li ankaŭ akceptis la funkcion de vicprezidanto de ILEPTT (Internacia Ligo por Esperanto ĉe la Poŝto, Telekomuniko kaj Trafiko) kaj de Honora Prezidanto de la Aŭstria Esperantista Federacio. Konekse pri Esperanto lia nomo lastjare estis nomata en diversaj artikoloj en „Heroldo de Esperanto".

Kaj nun d-ro K. Dworschak kronis siajn meritojn pri Esperanto per eldono de a ŭ s t r i a E s p e r a n t o - p o ŝ t m a r k o, eldonota la 1-an de Junio ĉj. okaze al la Aŭstria Esperanto-Kongreso en Graz, la 16.—20. 7. 1949. Pro ĉi tiu gravega publika subteno de la Esperanto-movado, d-ro Dworschak certe meritas la dankeman agnoskon de la tutmonda Esperantistaro.

Tial la aŭstriaj Esperantistoj estas fieraj pri „sia ĝeneral- direktoro" kaj Honora Prezidanto, kiu en la movado ne n u r okupas honoran funkcion, sed ĝin p r a k t i k e u t i l i g a s por la bono de Esperanto.

Sub la stelcielo

Estas trankvila, silentema nokto. Mi sidas sur benko de mia ĝardeno. La trembrilaj steloj afable kaj gaje salutas de sur la nigreblua ĉielkupolo. Kiel ĉarme ili briletas! Grandaj kaj malgrandaj, ruĝaj, flavaj kaj bluete lumantaj steloj ornamas la nigran, molan velurfundamenton de la firmamento kaj super ili la delikata vualrubando de la „laktovojo" transpaŝas ilian grandan, oran armeon. Ho, kiel trankvila estas la mondo! La homo ektremas rigardante la majestan pompon de la stelornamita ĉielo kaj la animo respekteme estas regulata laŭ ĉi tiu majesta grandeco kaj admiras la ĉiupovon de la kreinto. Estas, kvazaŭ la patrino metus sian molan manon sur mian varmegan, dolorigan frunton. Kie ajn rompiĝinta kaj forlasita homo levas la rigardon al ĉi tiu ĉiela belegaĵo, tie fluas konsolo kaj kvietiĝo en la turmentitan

koron kaj ĉiuj doloroj kaj sopiroj estas forigitaj. Ĉar super la steloj loĝas la paco!

Sed baldaŭ mi vekiĝis en miaj belaj revoj. Kion mi vidas ĉarme kaj delikate lumi tie sur la firmamento ne estas pacema trankvilo, ne estas nura okulĝojo por konsoli la homan animon, ĝi estas vidata de la perspektivo de malgranda terloĝanto. Grandaj scienculoj kaj astronomoj uzis specialajn aparatojn por malkovri la sekretajn misterojn de la ĉielo. Tiuj viroj estis benataj de Dio povi ekkoni, ke ĉi tiuj ĉarmaj steletoj estas gigantaj fajrogloboj de grandega amplekso, kiuj laŭ neimageble longaj distancoj traflugas la senfinan universon tiel rapide, ke ni eĉ ne havas proksimuman imagon. Milionoj da tiaj gigantaj fajrogloboj, multe pli grandaj ol nia suno, traflugas la senfinan kosmon kaj ĉiu unuopa el ili estas ĉirkaŭata de pluraj planedoj kaj trabantoj pli grandaj ol nia tero.

Kaj subite la steloj ŝajnis diri al mi: „Ho vi, bedaŭrinda hominfano, kia vanta naivulo vi estas! Kompatinda etulo, ĉu vi fakte kredas, ke vi estas la vera estro de ĉiuj vivantaj estaĵoj de la tero, kiun vi fiere nomas la tutmondon? Pripensu nur, ke via tero, kiun vi rigardas la plej grava parto de la univero, ke via granda tero, sur kiu oceanoj kaj kontinentoj disvastiĝas, kompare kun la giganta grandeco de la ceteraj astroj, estas nur eta polvero! Sensignifa neniomo ĝi estas kaj por ni ĝi preskaŭ ne ekzistas. Tio estas la tero, via granda tero, sur kies supraĵo kreskas arbaroj kaj herbejoj kaj sur kiu la homoj arogante malŝparas sian mallongan vivon mortigante kaj disŝirante sin reciproke pro egoismaj vanteco kaj malamo en sangaj militoj! Vi, la sinjoroj de la kreitaĵo, vi faris abomeman ĥaoson el la belega, idila paradizo de Dio! Kaj vi volas esti la estroj tutmonde? Ho, kia freneza iluzio, kia eraro! Ne, ne, neniam viaj vantaj revoj pri mondregado povas efektiviĝi, ĉar vi eĉ ne povas paceme vivi kun viaj propraj vivkunuloj. Rigardu la mizeron kaj la suferojn, regantajn super ĉiuj homoj de via bedaŭrinda tero! Rigardu la mortantajn landojn kaj urbojn sur via mizera terglobo! — Ne, ne kaj denove ne, neniam vi povas esti la estro de la mondo, ĉar malsato, mizero kaj detruadoj estas la potencoj, malhelpantaj la efektivigon de via intenco. Forpelu viajn kuraĝajn revojn pri mondregado, ĉar neniam ili efektiviĝos!“ ...

Konsternite pro la terura parolado de la steloj, mi eksaltas kaj rapidas en mian loĝejon. Tie mi falas en mian liton kaj malespere ploras pro la vanaj klopodoj de la homoj por ripari la terurajn domaĝojn de la milito pasinta kaj venigi ĉiaman mondpacon. Fine mi ekdormas kaj kvazaŭ kiel Dia donaco mi havas la plej belan sonĝon: Mi vidis grandan verdan stelon, flugpendanta super la terglobo. En ĝia mezo staris granda, blanka litero „E“ kaj subite ĉe tiu stelo ekparolis al mi:

„Kvietiĝu, mia karulo, post la teruraj vortoj aŭditaj de la steloj, Dio mem min sendis por elkonduki kaj liberigi la malfeliĉan homaron de ĝiaj suferadoj. Mia tasko plej granda estas porti feliĉon kaj pacon en tutmondon kaj unuigi la terloĝantojn. Mi instruos ilin, ke homamo kaj reciproka interkompreniĝo inter la popoloj estas la plej valoraj trezoroj de la vivo. La homoj ĝenerale ne estas malbonaj, oni nur malbonigis ilin. En iliaj brustoj frapas kompatemaj koroj, en kiuj amo loĝas de komenco. Oni nur devas veki kaj varti ĉi tiun altan etikon. Estu certa, ke ĉiuj homoj volonte kaj ĝoje akceptos miajn instruojn, kiuj garantias eternan mondpacon. En frata unueco homoj kaj popoloj tutmonde kune travivos la plej belajn tagojn ĝis la mondfino. Benata tempo venos, dum kiu miskonfido, malamo, furiozaj militoj kaj bataloj estos nekonataj aferoj, ĉar ĉiuj terloĝantoj kunvivos en granda unueca familio!“

Jen mi vekiĝas, gaje saltas el la lito kaj larĝe malfermas la fenestron, tra kiu enpenetras la unuaj radioj de la leviĝanta suno. Tiumomente mi havas la senton povi ĉirkaŭbraki ĉiujn homojn kaj devi elvoki: „Suno, ora suno, estu bonvena! Mi salutas kaj dankas vin, ke vi donacas al ni novan tagon, per kiu vi alproksimigas nin denove unupaŝe al nova, pli feliĉiga epoko, al la ideala, de ni sopirata epoko de la mondcivitanoj!“

Rudolf Bittmann.

Kritika respondo el Usono

En numero 7—9/1948 de AER ni publikigis artikolon „De Kanado — tra Usono — al Aŭstralio“ de Herbert Koppel, en kiu li priskribis kritikajn observojn de vojaĝanta Esperantisto. S-ano H. K. estis iama funkciulo en la aŭstria E-movado, serioza homo, kaj tial ni akceptis lian artikolon.

Sed nun venis kritika respondo pri liaj observoj de la Prezidanto de la E-Asocio de Nord-Ameriko, s-ro d-ro William Solzbacher, kiu deklaris, ke la informoj de s-ano H. K. ne estis objektivaj. Tial ni lojale donas lokon ankaŭ al la refutoj flanke de EANA. — La redakcio.

S-ro Koppel pasigis nur kelkajn tagojn en Usono kaj kolektis de diversaj malamikoj de la Centra Oficejo de EANA kritikojn, onidirojn kaj insultojn. Miksante ilin, li fabrikis strangan salaton, kiun li prezentis al la redakcio de via revuo kun la konkludo, ke „la Esperantomovado en Usono nuntempe estas malsana“. Fakte li scias nenion aŭ preskaŭ nenion pri tio, kion li pritraktis.

En ĉiuj landoj ekzistas disputemuloj kaj ambiciuloj, kiuj ne volas kunlabori kun la estroj demokrate elektitaj de la landa asocio, sed preferas organizi siajn proprajn movadojn, institutojn, gazetojn, libroservojn ktp. Se mi ne eraras, mi legis en Aŭstria E-Revuo, ke eĉ en via

lando ekzistas tiaj personoj, kiuj ĉiam volas „friti sian propran kolbason“ anstataŭ kunlabori kun la landa asocio kaj akcepti necesan organizan disciplinon.

La vero estas, ke la E-Asocio de Nord-Ameriko depost longa tempo ne havis tiom da membroj kiel nun, ke ĝi neniam havis tiom da simpatiantoj en influhavaj rondoj kaj ke ĝi neniam havis laborprogramon tiel praktikan kiel nun. Tio certe estas ĉefe la merito de ges-roj Connor. La elekto de s-ro Connor kiel ĝenerala sekretario estis unuanima. Kiel nuntempa prezidanto de la estraro de EANA mi konstatas, ke la Centra Oficejo laboras en plena harmonio kun la estraro kaj ekzekutiva komitato.

Depost elekto de s-ro Connor la nombro de membroj daŭre kreskis. Ges-roj Connor faris paroladojn kaj Cseh-metodajn demonstraciojn en centoj da lernejoj kaj organizoj, propagandis kaj instruis Esperanton per radio, publikigis artikolojn en ĵurnaloj kaj gazetoj kun milionoj da legantoj, enigis kompletajn Esperanto-partojn en gravan lingvistikan libron uzatan en universitataj kursoj kaj en popularan deklingvan frazlibron, de kiu vendiĝis 50.000 ekzempleroj. Kune kun pastro Kao kaj mi, ili verkis la libron „Esperanto: The World Interlanguage“, kiu estas ĝenerale rekonata kiel unu el la plej gravaj anglalingvaj libroj pri Esperanto iam publikigitaj. Kion ajn diras s-ro Koppel, „Amerika Esperantisto“ sub la redakto de s-ro Connor akiris la reputacion de unu el la plej bonaj, plej viglaj, plej seriozaj kaj belaspektaj gazetoj en la movado. S-ino Connor estis la oficiala reprezentantino de la Usona Ŝtata Departemento en la Universala E-Kongreso 1939.

S-ro Koppel evidente ŝatas skribi pri aferoj, pri kiuj li scias nenion. Li diras, ke iu fraŭlino parolis pri Esperanto ĉe la UNESCO-Konferenco. Tiu organizo neniam havis konferencon en Usono.

Li ankaŭ esprimas strangajn ideojn pri la taskoj de UEA-Delegitoj. Ĉiu Esperantisto volonte babilas kun eksterlanda samideano, kiam lia tempo kaj liaj aliaj okupoj tion permesas. Delegitoj havas la devon plenumi konkretajn servojn. S-ro Koppel ne menciis, ĉu li bezonis helpon pri iu praktika servo. Por respondi al ĉiuj falsaĵoj en la artikolo De Kanado — tra Usono — al Aŭstralio mi bezonus kelkajn paĝojn, sed mi volas fini per tio.

D-ro W. Solzbacher.

La lando Tirol

Tiun ĉi artikoleton ni ĉerpis el la bonega revuo „LA VIVO“ organo de „Amikoj de la Homaranismo“. Administracio: Siem de Geus, HEILO (N-H-) Nederlando. — La redakcio.

Se mi aŭdas tiun nomon kaj malfermas miajn okulojn, mi vidas nek la belegajn montfluojn, nek la valojn kun la malnovaj urbetoj, eĉ

ne la imponan naturon, sed unue la homojn. Tie en la bela, gastama Landeck, mi havis la iluzion esti en Esperantujo.

Invitita de la familio Hilkersberger staris grupo da junaj nederlandanoj sur la malgranda perono de la stacidomo Landeck. En la mezo de la nokto, laca, dormema en la mallumo. Kaj tie aperis, portita de la infanoj de nia gastiganto, nia flago kun la verda stelo kaj de tiu momento ni estis en Esperantujo dum dekkvar tagoj. De tiu momento ĉiu el la grupo ne povas ne scii, ke veraj gekamaradoj invitis nin.

La du semajnoj nur estis granda fluo da amo, da amikeco, da ĝojo, sed mi ne povas rakonti kion ni travivis. Estis tro multe.

La nederlandanoj surgrimpis la montojn, serĉis kaj trovis edelvejson, vizitis preĝejojn ktp. ktp. kaj . . . ĝuis kiel neniam.

Ankoraŭfoje mi travivas la lastan momenton. Unu el la familio donis al la virinoj unu rozon. Sed kiamaniere. Estis oro por ni, kaj multaj gastoj ne povis kaŝi sian emocion.

Ŝajnis al ni: Estas la tempo, ke la homoj ĉesis esti lupoj unuj kontraŭ la aliaj. Anstataŭ konstante batali inter si, elŝiri la patrujon unuj de la aliaj, perforte altrudi al si reciproke siajn lingvojn kaj morojn, ili vivis inter si pace kaj frate, laborante kune; kaj interkonsente ili celadis ĉiuj al unu vero, al unu feliĉo . . .

Sed bedaŭrinde . . . nur ŝajnis . . .

Iu el la nederlanda grupo.

Aŭstria poŝto en prospera rekonstruo

Laŭ raporto de la ĝenerala poŝtdirektoro, sekcia ĉefo d-ro Karl Dworschak, la aŭstria poŝto en 1948 plenumis gravegan agadon. Transportitaj estis: 489,228.000 ordinaraj leteroj, 20,826.000 registritaj leteroj, 303,473.000 gazetoj, 13,955.000 paketoj, 8,323.000 monasignoj, kaj 3,763.000 telegramoj. En la poŝtŝparkasa kaj ĉek-interkomunikoj estis prilaboritaj 28,275.000 objektoj.

La nombro de la poŝtaŭtobusaj linioj altiĝis de 340 al 450 kaj la nombro de la aŭtobusoj de 470 al 626. La veturitaj kilometroj estis 18,000.000 kaj transportitaj estis ĉirkaŭ 30,000.000 pasaĝeroj.

Krome la rekonstruado de la telefona reto atingis preskaŭ jam la normalan staton malgraŭ la multegaj domaĵoj kaŭzitaj dum- kaj postmilite.

Tiun bonegan agadon la aŭstria poŝta administracio atingis sub la energia kaj progresema gvidado de sia ĝenerala direktoro d-ro Karl Dworschak, kiu ankaŭ estas varma amiko kaj favoranto al Esperanto, pro kio la pasintjara aŭstria E-kongreso en Linz elektis lin Honora Prezidanto de AEF.

*

„Bohemica Viennensia"

Antaŭ kelka tempo aperis en la speciala numero de la ĉeĥoslovaka kulturinformilo „Bohemica Viennensia", aperanta en Vieno (XX., Wasnergasse 35) interesa artikolo titole: „Nia konfeso al Aŭstrio", el kiu ni ekstraktis jenan finalineon:

Fidante al la aŭstria demokratio kaj la ĉiam pli grandiĝanta libereco, ni hodiaŭ volas renovigi nian konfeson al Aŭstrio. Tamen ni neniam forgesos nian hejmlandon kaj volas kiel lojalaj aŭstriaj ŝtatanoj ankaŭ al ĝi fidele kaj honeste servi en la ideo de la paco kaj popola interkompreniĝo.

*

Aŭstria nilono (Nylon). Por la virinoj, kiuj ankoraŭ devas ŝtopi la ŝtrumpojn kaj ripari la kurmaŝojn, venas el Salzburg esperplena sciigo. En Hallein kemia firmao evoluigis artŝtofon, kiu en ĉiuj ecoj preskaŭ estas egalvalora al la usona nilono. Kiel krudmaterialoj por la produktado estas bezonataj klorgaso, koakso kaj karbido. Pro la liverado de la klorgaso per la saluzinoj en Hallein kaj de la karbido per la aluminiuzino en Lend, la produktado povas esti entreprenata. La nova artŝtofo — nomita PVC — estas aplikota por teksaĵoj, ŝuoj, mebloŝtofoj kaj ankaŭ por ŝtrumpoj. Pro ĝia granda etendebleco kaj elasteco ĝi ankaŭ fariĝos valora krudmaterialo por la industrio. La ministerio por ekonomia planado jam donis la aprobon pri amasproduktado.

ESPERANTO-MONDO *en Aŭstrio*

Österreichischer Esperanto-Kongreß Graz 1949

16.—20. Juli 1949 im Mahagonisaal der Arbeiterkammer Graz.

Samstag, 16. Juli 1949

Ankunft der Kongreßteilnehmer, Einweisung in die Quartiere.

16 Uhr: Eröffnung der Esperanto-Ausstellung in der Landesbibliothek. Eröffnungsrede im Landesmuseum in der Neutorgasse.

20 Uhr: Eröffnung des Esperanto-Kongresses und Begrüßung im großen Saal der Arbeiterkammer.

Sonntag, 17. Juli 1949

8 Uhr: Esperantopredigt und Gottesdienst in der Ursulinenkirche, Sackstraße 17.

9 Uhr: Fachsitzung der katholischen Esperantisten im Lokal Sackstraße 19 (neben der Kirche).

11 Uhr: Photoaufnahme der Kongreßteilnehmer bei der Oper.

14 Uhr: Führungen durch das Stadtmuseum, Besichtigung von Graz.

20 Uhr: Steirertanzabend in der Schloßbergrestauration. (Wenn möglich in Landestrachten erscheinen!)

Montag, 18. Juli 1949

Fachsitzungen im Gebäude der Arbeiterkammer:

Im Mahagonisaal: 8—9 Uhr: SAT-Mitglieder. — 9—11 Uhr: Arbeiter-Esperantisten. — 11—12 Uhr: „Naturfeunde"-Esperantisten. — 14—16 Uhr: Eisenbahner-Esperantisten.

Im Vortragssaal: 8—9 Uhr: UEA-Mitglieder. — 9—11 Uhr: Res. für Neuanmeldungen. — 11—12 Uhr: Philatelisten. — 14—16 Uhr: Gesellschaft der Freunde des Esperanto.

17 Uhr: Empfang der Funktionäre der österreichischen Esperantobewegung und der ausländischen Delegierten durch den Landeshauptmann und den Bürgermeiter von Graz im Sitzungssaal des Rathauses.

Gleichzeitig Platzkonzert auf dem Hauptplatz.

Anschließend: Begrüßung der Kongreßteilnehmer auf dem Hauptplatz durch den Landeshauptmann und den Bürgermeister vom Balkon des Rathauses.

18 Uhr: Feierliche Namensgebung der Verkehrsfläche bei der Arbeiterkammer als „Esperanto-Platz".

20 Uhr: Unterhaltungsabend im großen Saal der Arbeiterkammer mit Musik, Gesang und heiteren Vorträgen.

Dienstag, 19. Juli 1949

8—9 Uhr: Sitzung des Österreichischen Esperanto-Institutes (Vortags- oder Mahagonisaal).

9—10 Uhr: Fachsitzung: „Fremdenverkehr" im Mahagonisaal.

10—12 Uhr: Jahreshauptversammlung des Österreichischen Esperantisten-Verbandes im großen Saal.

14—18 Uhr: Fortsetzung der Jahreshauptversammlung.

18 Uhr: Schlußansprache des Kongreßvorsitzenden.

20 Uhr: In der Universität: Vorträge und Vorlesungen des Österreichischen Esperanto-Institutes.

Mittwoch, 20. Juli 1949

7 Uhr: Fahrt nach Peggau.

8—12 Uhr: Führungen durch die Lurgrotte.

12 Uhr: Gemeinsames Mittagessen. — Abschied.

Abänderungen oder Ergänzungen des vorstehenden Programmes vorbehalten.

Für das Esperanto-Kongreßkomitee
der geschäftsführende Vorsitzende
Josef Eder

Einladung
zur
4. Jahreshauptversammlung
des
Österreichischen Esperantisten-Verbandes

welche einberufen wird für Dienstag, den 19. Juli nach Graz und stattfindet im Rahmen des Österreichischen Esperanto-Kongresses. Tagungsort: Mahagonisaal der Arbeiterkammer Graz. Beginn 10 Uhr vormittags.

Tagesordnung:

1. Eröffnung durch den Verbandspräsidenten, Minister a. D. Dr. Hans Frenzel.
2. Wahl eines Mandatsprüfungs-, eines Antragsprüfungs- und eines Wahlvorschlagskomitees.
3. Tätigkeitsberichte: a) Vorstand, b) Kassier, c) Redaktion, d) Esperanto-Institut, e) Landesleitungen und Delegierte, f) Fachgruppen, g) Mandatsprüfungskomitee, h) Kontrolle.
4. Referat über ein aktuelles Thema.
5. Bericht des Wahlvorschlagskomitees.
6. Neuwahl des Verbandsvorstandes.
7. Bericht des Antragsprüfungskomitees. — Beschlußfassung über satzungsgemäß eingebrachte Anträge.
8. Festsetzung des Jahres-Mitgliedsbeitrages.
9. Referat über die nächste Tätigkeit des Verbandes.
10. Allfälliges. — Schlußwort.

Laut § 16, Punkt 11 der Statuten müssen alle Anträge zur Hauptversammlung schriftlich begründet spätestens 6 Wochen, solche auf Abänderung der Satuten 8 Wochen vor Abhaltung derselben beim Verbandsvorstand eingebracht werden.

Raimund Cech
geschäftsführender Obmann

Dr. Hans Frenzel
Präsident des Verbandes

Maria Zajicek
Schriftführerin

Auszug aus den Satzungen des Österreichischen Esperanto-Verbandes.

§ 15 Verbandsdelegierte.

1. Vereinigungen üben ihr Stimmrecht bei den Hauptversammlungen und außerordentlichen Hauptversammlungen nur durch Delegierte aus. Sie haben zu diesem Zwecke auf je angefangene 30 Mitglieder, für die laut letzten Vierteljahresausweises der Beitrag ordnungsgemäß an den Verband abgeführt wurde, einen Delegierten zu wählen.

2. Da jede Vereinigung bei der Verbands-Hauptversammlung vertreten sein soll, haben diese, im Falle der Unmöglichkeit, einen Delegierten selbst zu entsenden, die Pflicht, dafür Sorge zu tragen, daß ein von einer anderen Vereinigung entsandter Vertreter die Stellvertretung übernimmt. Es ist auch möglich, die Verbandsleitung zu ersuchen, für die Vertretung das Nötige zu veranlassen.

3. Den Delegierten (auch deren Stellvertretern) ist von ihrer Vereinigung eine ordnungsgemäß ausgestellte Legitimation über ihr Mandat und die Anzahl der vertretenen Mitglieder einzuhändigen.

4. Die Delegierten stimmen mit der von ihnen vertretenen Mitgliederzahl bei allen Abstimmungen ab.

5. Die Delegierten sind mindestens 4 Wochen vor Beginn der Hauptversammlung der Verbandsleitung bekanntzugeben.

§ 18. Die ordentliche Hauptversammlung.

4. Die Teilnahme ist jedermann, auch Nichtmitgliedern gestattet.
5. Als stimmberechtigt erscheinen jedoch nur:
a) der Verbandsvorstand mit allen seinen Mitgliedern,
b) alle Landesleitungen,
c) der Kontrollausschuß,

d) die Delegierten mit der Zahl der von ihnen vertretenen Mitglieder,
e) Einzelmitglieder, sofern sie nicht bereits durch einen Delegierten vertreten sind.

6. Alle nicht unter Punkt 5 genannten Teilnehmer haben nur beratende Stimme.

Kongreßdelegierte.

Die Landes-, Bezirks- und Gruppenleitungen der AEF werden ersucht, unverzüglich ihre Delegierten zum Landeskongreß zu wählen und ehestens ihre Anschriften dem Esperanto-Centro in Wien bekanntzugeben.

Was muß jeder Teilnehmer am Esperanto-Kongreß wissen?

Wichtige Adressen: Aus Wien sind allen den E-Kongreß betreffenden Zuschriften zu richten an: Esperanto-Centro, Wien I., Neutorgasse 9.

Anmeldungen und Zuschriften aus den Bundesländern: Esperanto-Kongreß Graz 1949, Graz. Bei allen schriftlichen Anfragen Rückporto beilegen!

Sofortige Anmeldungen notwendig, da die Unterbringungsmöglichkeiten in den Sommermonaten in Graz sehr beschränkt sind.

Urlaub sichern! Alle Teilnehmer, die im Beruf stehen, sichern sich schon jetzt an ihrem Arbeitsplatz die notwendige Zahl von Urlaubstagen.

Die Teilnehmer aus Wien melden sich mittels des beiliegenden Anmeldeformulares und unter gleichzeitiger Einzahlung des Kongreßbeitrages von S 10.— (für Familienmitglieder S 5.—) pro Person beim Esperanto-Centro Wien I., Neutorgasse 9.

Die Teilnehmer aus den Bundesländern melden sich unter den gleichen Bedingungen beim Kongreßkomitee in Graz. Adresse: Esperanto-Kongreß Graz 1949, Graz.

Nach dem 1. Juni 1949 ist der Kongreßbeitrag pro Person S 15.— und für jedes Familienmitglied S 7.—.

Aŭstria Esperanto-Kongreso 1949
okazos de la 16. — 20. Julio 1949 en la ĉefurbo de Stirio, Graz, en la mahagona salonego de la Laborista ĉambro.

Leter- kaj telegramadreso: Esperanto-Kongreso Graz 1949, Graz, Aŭstrio.

Esperanto-poŝtmarko
okaze al la E-Kongreso estos eldonata de la aŭstria poŝtadministracio kaj en la kongresejo estos uzata ekstra poŝtstampilo.

Kongressubvencion de ŝil. 3000.— donis la Landa Registaro de Stirio kaj 2000.— ŝil.
promesis la urbestro de Graz al la Loka Kongresa Komitato.

Landestro de Stirio Josef Krainer kaj **urbestro de Graz prof. d-ro E. Speck** afable transprenis la protektadon super la Aŭstria Esperanto-Kongreso.

Flagoj
estos sur la administraj domoj de la urbo Graz honore al la Kongreso.

Oficiala akcepto.

Landestro de Stirio kaj urbestro de Graz solene akceptos la Esperantistajn funkciulojn kaj eksterlandajn delegitojn kaj gastojn en la urbdomo kaj salutparolos al la kongresantoj de sur la urbdoma balkono. Sur la ĉefplaco muzikos orkestro okaze al la akcepto.

„Esperanto-placo“
en la proksimo de la kongresejo solene estos inaŭgurata post la akcepto.

En la universitato de Graz
okazos paroladoj pri Esperanto. Profesoro Adolf Hainschegg parolos pri „Esperanto kaj la poezio“. Aliaj referatoj kaj prelegoj estas en preparo.

Katolika Diservo kun Esperanto-prediko
okazos komence de la Kongreso en la Ursulinen-preĝejo.

Esperanto-ekzamenoj
pri la scio de la lingvo kaj instrukapableco okazos en la kadro de la kongreso.

Esperanto-balo
kun naciaj dancoj en naciaj kostumoj estos aranĝata, kiu donos al la kongresantoj eblecon por gaja amuziĝo.

Rabato sur la tramo
por la kongresantoj estis proponata de la urbestro al la direkcio de la urba tramentrepreno.

Ekskursoj
en la belan ĉirkaŭaĵon de Graz kaj vizito de vidindaĵoj ĝojigos ĉiujn kongresanojn.

Jara ĉefkunveno de AEF
kaj diversaj fakkunsidoj estos aranĝata en la kadro de la Kongreso.

Promesas ĉiuj tiuj aranĝoj, ke la Aŭstria Esperanto-Kongreso en Graz fariĝos grava kaj impona manifestacio Esperantista kaj ni esperas, ke ne nur la aŭstria Esperantistaro el ĉiuj federaciaj landoj multnombre partoprenos nian Kongreson, sed ĝin ankaŭ vizitos — afable invitate — laŭable multaj delegitoj kaj gastoj el la eksterlando.

Petante informojn de la LKK bonvolu aldoni reafrankon.

La Loka Kongresa Komitato.

Esperanto-poŝtmarko aŭstria

Ni ĝoje povas komuniki al la Esperantistaro, ke ni en Aŭstrio denove atingis gravan sukceson. Okaze al la Aŭstria Esperanto-Kongreso 1949 en Graz (16.—20. 7. 49) la aŭstria poŝta administracio eldonos specialan Esperanto-poŝtmarkon valore de 20 groŝoj.

Jam nun ni atentigas la ges-anojn pri tio, ĉar ili havos bonan okazon por afranki presaĵojn kaj skribaĵojn per la aŭstriaj E-poŝtmarkoj kaj tiamaniere ilin povos havigi ankaŭ al siaj gekorespondantoj en tutmondo.

La peton eldoni E-poŝtmarkon faris la estraro de AEF al la aŭstria poŝta administracio, sed la decidon pri la fakta eldono de la marko ni dankas al la ĝenerala poŝtdirektoro, s-ro sekcia ĉefo d-ro Karl Dworschak, kiu per tio denove pruvis sian gravan subtenon al la E-movado.

Nia danko same decas al s-ano kalkul-konsilisto R. M. Frey, kiu ankaŭ multe klopodis pri la eldono de la poŝtmarko kaj ni gratulas al la instiginto de la afero, al nia ŝatata afergvidanto s-ano Raimund Cech, ke lia propono tiel bone sukcesis.

Laborista ĉambro subvencias AEF-on

Laŭ petskribo de AEF la estraro de Laborista ĉambro de Vieno decidis subvencii la aŭstrian E-movadon per la sumo de ŝil. 1500,—.

Sincere ni dankas al la Laborista ĉambro pro ĉi tiu grava financa helpo por la kulturaj celoj de la aŭstria E-movado, per kio la ĉambro samtempe montris sian simpation al la ideo de lingvo internacia.

Aŭstria Instruministerio subvenciis AEF-on

Ni ĝoje povas komuniki, ke ankaŭ la instruministerio subvenciis la agadon de AEF per la sumo de ŝil. 1000,—, pro kio ni dankas nome de la aŭstria E-movado.

En la skribaĵo de la ministerio estis esprimata la deziro, ke la sumo prefere estu uzata por instali E-kursojn inter la geinstruistaro.

AEF volonte plenumos ĉi tiun deziron kaj esperas, ke la geinstruistoj same favore juĝas pri Esperanto kiel la instruministerio kaj multnombre anoncos sin por partopreni E-kursojn.

Subvencio de la urbo Vieno al AEF

La Kultura Oficejo de la urbo Vieno komunikis al AEF, ke la komununa konsilantaro la 23. 12. 1948 decidis subvencii la E-movadon per la sumo de ŝil. 500,—.

Pro tiu ĉi bonvena monsubteno ni esprimas sinceran dankon al la urbo Vieno.

Granda vortaro de AEF

La E-centro dufoje per cirkuleroj jam atentigis la ges-anojn, ke ĝi urĝe bezonas monon por povi eldoni la avizitan vortaron kaj petis ilin, laŭpove antaŭpagi por la vortaro ŝil. 10,— aŭ doni krediton por la eldono.

La alvoko bedaŭrinde ne trovis la necesan ehon kaj ĝis nun nur enfluis ĉirkaŭ ŝil. 1200,—. Tamen multaj ges-anoj konstante demandas, kiam do la vortaro fine aperos.

Por la eldono estas bezonata la granda sumo de ŝil. 20.000,— kaj ĝis nun nur kvarono de tiu ĉi sumo estas disponebla. Tial denove ĉiuj ges-anoj, kiuj bezonas bonan kaj ampleksan vortaron, estas urĝe petataj, ke ili laŭeble antaŭpagu ŝil. 10,—, kiu sumeto al ili per la eldono de la vortaro certe estas garantiata. Sed ankaŭ pli altaj kreditoj danke estas akceptataj.

Librośparado

La librośparado, enkondukita antaŭ du jaroj, preskaŭ tute forgesiĝis. Ni alvokas la Esp.--grupojn varbi denove kaj instigi ĉiujn gesamideanojn akiri per malgrandaj sumetoj Esp.-librojn, samtempe helpante al la malfacila eldonado de novaj verkoj. La valoro de ĉiu lingvo mezuriĝas laŭ ĝia literaturo. Esperanto bezonas eĉ pli bonan literaturon ol la naciaj lingvoj. Tial kontribuu vian parton per librośparado!

Demandu en viaj grupoj, kiuj petu śparmarkojn de la AEF.

E-grupo „Centro" — Wien

sekvis la alvokon de la E-Centro pri donacoj por la movado (vidu AER n-ro 1—2/49, pĝ. 12) kaj ankaŭ donacis kiel jam antaŭe la grupo „Fonto", Felixdorf, la sumon de ŝil. 100,—. Pluaj donacoj: inĝ. Sch. Wien III. ŝ. 20.—, s-anino L. Ziwutschka ŝ. 22,—, Rudolf Slivka, Kapfenberg, ŝ. 15,—. Koran dankon!

Danublanda Kontakta Komitato

Laŭ decido de la E-Asocio en ČSR, dissendi siajn kunsidprotokolojn al ĉiuj DKK-anoj por reciproka informo, ankaŭ la estraro de Aŭstria E-Federacio decidis fari la samon. — DKK eble denove kunvenos unu semajnon antaŭ la UEA-Kongreso en Bratislava, Slovakujo.

Plua sciigo sekvos.

Aliĝu al UEA!

Per pago de monate nur ŝil. 1,— vi povas fariĝi membro de la Universala E-Asocio. Vi rajtas voĉdoni kaj kundecidi en la movado kaj kongresoj de UEA. Kun la abono de la organo „Esperanto" vi pagas jare ŝil. 25,—. Anoncu vin tuj ĉe la UEA-ĉefdelegito por Aŭstrio, s-ro Mag. Franz Höfert, Wien XIV., Penzingerstr. 121. Dezirante informojn skribajn, aldonu afrankon.

E-grupo „Verda Stelo", Wien V.

okazigis la 31. 1. 1949 sian jarkunvenon kaj elektis la novan estraron. Pasintjare la grupo kunvenis 43 foje, 560 personoj partoprenis la kunvenojn, krome la grupanoj multnombre ĉeestis la aranĝojn de la E-Centro. Al la AEF-estraro apartenas 3 grupmembroj. La grupa vivo entute bone prosperas. La biblioteko anhavas 60 librojn. En ia kadro de la Popola altlernejo Wien V., estis aranĝitaj 2 E-ekspozicioj.

Radio Wien II

dissendas E-programon ĉiuĵaude de 18,45—19,00 h MET sur metroj 228,6, 31,05 kaj 41,81. Viajn impresojn kaj dezirojn komuniku al: RAVAG Wien IV., Argentinierstr. 30a aŭ al la Radio-Servo de AEF, Wien I., Neutorgasse 9, kiu ankaŭ danke akceptas taŭgajn mallongajn manuskriptojn por la dissendado (5 aŭ 10 minutojn).

Radio „Alpenland", Graz

dissendis la 4. 2. 1949 paroladon de la AEF-Landestro por Stirio, s-ano d-ro Adolf Halbedl, Knittelfeld, kiu enkondukis la E-kurson ĉe tiu ĉi sendilo. Sendoj okazas ĉiuvendrede de la 18,15—18,30 h. Direktu agnoskajn leterojn aŭ kartojn al Radio-sendilo „Alpenland", Graz, Zusertalgasse 14 a. Aŭstrio.

Abonantoj al „Heroldo de Esperanto“ kiuj ĝis nun ankoraŭ n e pagis la abonon por 1949 (jarabono ŝil. 35,—), estas petataj t u j sendi la monon al „Tramondo“, Wien I., Neutorgasse 9.

„La Vivo“
organo de Amikoj de la Homaranismo. La reprezentantecon por Aŭstrio transprenis s-ano A. Hilkersberger, Haus Espero, Landeck, Tirol. Jarabono ŝil. 9,—. Informoj kontraŭ reafranko.

„Verda Stelo“, Salzburg

La 11. 12. 1948 okazigis la grupo Zamenhof-feston, kiun malfermis estro s-ano F. Fötinger. La festparoladon en modela Esperanto faris kadetrala vikario J. K a p s, estro de la katolika E-unuiĝo de Salzburg. En la kadro de la cetera programo transdonis estro Fötinger honorigan diplomon al la meritplena por la E-movado profesoro Fritz S c h e i r l kaj varme dankis lin pro lia aktiva kunlaboro sub aplaŭdego de la ĉeestantoj. Profesoro Scheirl emocie dankis al ĉiuj ges-anoj pro la honorigo kaj bondeziroj. En la bele ornamita salono trovis admiron busto de d-ro Zamenhof, arte skulptita de s-ano K. Kranzinger. La amuza parto de la festo ankoraŭ longe kunigis la ges-anojn kaj gastojn en amika atmosfero.

Tirol

Estro de la popollernejo „Jodler“ ĉe St. Johann en T., s-ro ĉefinstruisto J. Niederkofler, instruas en sia lernejo Esperanton por lernantoj. Dankon al li kaj gratulon! — Membro de la Landa Lernejkonsilantaro partoprenas leteran E-kurson. — En la vilaĝo Lauterbach s-anino A. Rainer el Kitzbühel gvidas E-kurson. — En la stacidomo Kufstein estas fiksita E-tabulo informanta la pasaĝerojn pri la adresoj de AES-delegitoj. — Teatra Grupo Esperantista „Nia Hermano“ (Visneider) estas fondita. — AEF-Landestro por Tirol, s-ano Hans Steiner, Kirchbichl, eldonas por la ges-anoj de la teritorio Tirol kaj Vorarlberg multobligitajn informleterojn, kiuj praktike komunikas gravajn aferojn el la E-movado.

Bildpoŝtkartoj
kun belaj ilustraĵoj de la lokoj Kirchbichl, Landeck, Mayerhofen kaj Schwaz en Tirol, teksto german- kaj Esperantlingva, estis eldonitaj de la Landestraro de AEF por Tirol, pro kio s-ano Hans Steiner vere meritas dankon kaj laŭdon pri ĉi tiu modela kaj imitinda por-esperanta propagando. Prezo popece nur 5 groŝoj plus eventualaj sendkostoj. Mendojn akceptas s-ro Hans Steiner, Esperanto-servo Kufstein, Tirol.

Vetrodlado en Schwaz
okazis la 9. 1. 1949 kaj prezentis imitindan samideanan kunestadon en freŝa vintra aero, kiu donis amuzon kaj eblecon por konversacio. Dum tiu ĉi vintra renkontiĝo de la ges-anoj en Tirol ankaŭ okazis kunsido de grupfunkciuloj kaj delegitoj por pridiskuti aferojn de la okazonta E-kongreso en Graz.

Aŭstriaj gazetoj raportas pri Esperanto

Jen listo certe nekompleta de gazetoj aŭ revuoj akceptantaj artikolojn kaj raportojn pri Esperanto:

W i e n: Arbeiter-Zeitung, Wr. Tageszeitung, Der Österreichische Volksruf, Neue Auslese, Radio Wien, Ruf der Jugend, Weltpresse.

N i e d e r ö s t e r r e i c h: Grenzbote Hainburg.

O b e r ö s t e r r e i c h: Linzer Tagblatt.

S a l z b u r g: Salzburger Tagblatt, Salzburger Volkszeitung, Demokratisches Volksblatt.

S t e i e r m a r k: Neue Zeit, Steirerblatt.

T i r o l: Tiroler Tageszeitung, Volkszeitung Innsbruck, Tiroler Nachrichten, Tiroler Neue Zeitung, Sonntagspost Kufstein (daŭrigota).

„Frohes Schaffen“ (Gaja agado)
libro por junuloj kaj aĝuloj. La XXII-a volumo, jaro 1948, de tiu ĉi grava kolekto enhavas sur paĝoj 265—275 interesan artikolon pri „Kunstsprachen“ (artlingvoj), lingvoscienca babilado de

s-ano profesoro d-ro Ernst J. Görlich, kun bildoj de Leibniz kaj d-ro Zamenhof.

La eldonejo por „Jugend und Volk" (Junularo kaj popolo) en Wien per ĉi tiu artikolo de nia fervora s-ano prof. d-ro Görlich donis gravan kontribuaĵon al la mondlingva afero en Aŭstrio. — R. C.

E-Klubo de Florianopolis, Brazilo

represis en la organo „Rio Esperantista" kaj en la kluba bulteno „Antaŭen" la noton ALARMO el AER n-ro 4—6/48 kaj afable informis nin letere, ke ĝi sendis tiurilatan leteron pri Esperanto al s-ro Trygve Lie, ĝen. sekr. de UNO. Ni ĝojas, ke nia noto trovis tian vastan ehon.

Nekrologo

Mortis la 1. 12. 1948 s-rino Anna Maralik, la kara edzino de nia ŝatata favoranto de Esperanto, s-ro Gustav Maralik, dentisto en Trieben (Stmk.). Ni kunfunebras pro lia grava perdo. Paco estu al ŝia cindro.

La mondcivitanismo en Aŭstrio

La kuraĝa ago de Garry Davis, kiu en Parizo disŝiris sian nacian pasporton kaj deklaris sin mondcivitano, estigis grandan simpation en la tuta mondo. En Aŭstrio formiĝis — laŭ komuniko de la Aŭstria Komitato Garry Davis — jam pli ol 100 grupoj, kiuj transprenis kaj propagandas la ideon de Davis.

Du Vienanoj, Gustav Krisch kaj Peter Hinterhofer, sekvis la ekzemplon de Garry Davis kaj ekprenis la gvidon de nova popolmovado por kreo de mondregistaro. La 22an de Februaro 1949 okazis en Vieno la unua amaskunveno vizitita de ĉ. 2000 personoj.

La gvidantoj alvokis por antaŭeviti trian mondmiliton, organizi la popolojn por elektado de mondparlamento, kiu kunvenu jam en aŭtuno 1950 en Ĝenevo. La nuna pereiga ŝtatmekanismo kun siaj malamikaj armeoj kaj la time gardataj landlimoj ne allasas mondpacon. Tia ebliĝos nur per unu mondregistraro, kiu sola rajtus havi polican trupon kaj disponi pri la rezultoj de la atomesplorado. Kromaj celoj estas: mondbanko kun unueca monsistemo, internacia planado de l'ekonomio, internacia juro, mondtribunalo kaj ne laste mondlingvo.

La diplomatoj en konferencoj ŝajne ne kapablas garantii la mondpacon, ankaŭ UNO evidente ne povas sukcesi. Tion povas fari nur la organizita volo de la popoloj mem. Kiam 50% de la popoloj estos decidintaj starigi mondparlamenton, tiu ĉi institucio ekfunkciu. La tempo treege urĝas, ĉar la definitiva katastrofo de la civilizita mondo minacas proksime.

Al la „Komitato Garry Davis" en Vieno estas alliigita societo „Universal-Union", kiu celas unuigi ĉiujn homojn, kiuj, kvankam restante aŭstriaj civitanoj, deklaras sin samtempe principaj mondcivitanoj. Tiu ĉi societo favoras Esperanton; laŭdire ĝi jam en sia dua kunsido en Decembro 1948 decidis akcepti Esperanton kiel oficialan lingvon de la nova movado.

La nomitaj centroj de la mondcivitanismo en Vieno estas jam en kontakto kun la Viena „Esperanto-Centro".

Esperantistoj, pacamantoj, kosmopolitoj!

La nova movado estas subteninda kaj bezonas la servojn de Esperanto. Interesiĝantoj ricevos informojn en la Esperanto-Centro aŭ rekte ĉe la „Komitato Garry Davis", Wien IX., Kolingasse 19.

E. Pebe.

Finleginte la revuon, sendu ĝin al via eksterlanda amiko

LABORISTA ESPERANTISTARO

Adreso: Austria Laborista Esperantistaro, Wien I., Neutorgasse 9

Laborista ĉambro de Graz kaj Leoben aranĝis Esperanto-kurson por laboristoj, gvidata de la ŝatata s-ano profesoro Hainschegg. Ni deziras plenan sukceson!

E-grupo de la „Naturamikoj"
fondiĝis, gvidata de k-do Max Finkenzeller. En la grupo ankaŭ povas esti pagata la jarkotizo por la turista unuiĝo „La Naturamikoj". Sidejo de la grupo: Wien XV., Diefenbachgasse 36. Kunvenoj: ĉiumarde de la 19—21 h.

„Laborista Esperantisto" nederlanda
nun aperas monate en eldonkvanto de 4000 ekzempleroj, kio denove pruvas la disvastiĝon de Esperanto inter la nederlanda laboristaro. Ni gratulas kaj kamarade deziras pluan prosperon!

22-a SAT-Kongreso
okazos la 30. 7.—5. 8. 1949 en Parizo.

Kotizoj: SAT-anoj aŭst. ŝil. 18,—. Por ne-SAT-anoj aŭst. ŝil. 23,—. Post la 15. 4. 1949: SAT-anoj aŭstr. ŝil. 23,—, ne-SAT-anoj 28,—. Korespondadreso: K-dino S. Glodeau, 115 Boulevard Aristide Briand, Montreul (Seine), Francujo.

O. K. K. komunikas: Kiuj deziras ĉeesti la kongreson, tuj sin anoncu al la landa SAT-peranto aŭ karavanestro de sia regiono, samtempe klopodante pri akiro de pasporto.

La respondeculoj, kiuj verkos peton pri vizo, enŝovu jenan tekston: La organiza komitato de nia kongreso en Parizo ricevis jenan informon de la franca ministerio pri eksteraj aferoj, fako: kulturaj rilatoj: . . . por partopreni la internacian Esperantistan kongreson . . . tiuj personoj simple deponu petojn pri vizo ĉe la franca konsulejo de sia urbo aŭ regiono. Referenco de la letero nepre citinda: SV/MP No 6855 R 2 C. Notu bone! La respondeculoj ne devas prokrasti, ili ankaŭ iom rondigu la nombron da kongresanoj en sia peto.

Aŭstrianoj, volantaj partopreni la SAT-kongreson tuj anoncu sin ĉe la landa peranto k-do L. Sager, Wien XVI., Maderspergerstr. 14/12. Por informoj aldonu reafrankon. Enpagu per la poŝtĉek-konto n-ro 193.114, Ludwig Sager.

30-a Kongreso de FLE en Nederlando

La 16.—18. 4. 1948 okazos la kongreso de la Federacio de Laboristaj Esperantistoj en Utrecht. Adreso: Sekretario J. C. Majoor, Bern. de Waalstraat 13, Utrecht, Nederlando. Aŭstria Esperantista Laboristaro deziras al la kongreso plenan sukceson.

Korespondadon deziras
laboristaj Esperantistoj en Belgujo kun gek-doj en Aŭstrio pri la laborista kaj cetera E-movado aŭstria, interŝangaŝ ĵurnalojn k. s. Adresojn peras k-do Kamilo Solot, Laborista Esp-istaro, Mangombroux Strato 97, Verviers, Belgujo.

„Solidarität",
la centra organo de la Aŭstria Sindikata Ligo aperigis en ĝia komplemento „Bau- und Holzarbeiter" („Konstruaj- kaj lignaĵlaboristo") numero 67/1948 priesperantan artikolon de k-do F. Stöckl, en kiu li pledas, ke en la instruplano de la sindikata funkciula lernejo en la (iama) kastelo Weinberg ĉe Kefermarkt ankaŭ Esperanto estu akceptata.

Sindikato eldonis E-lernlibron

La laborista sindikato Freie Gewerkschaft G. m. b. H. en Hamburg, Germanujo, finance ebligis la eldonon de la lernlibro „Esperanto" de August Weide. — Estus ĝojige, se sindikatoj ankaŭ en aliaj landoj similmaniere subtenus la laboristan Esperanto-movadon por doni al la laboristaro tutmonde la veran internacian interkompreniĝilon.

ALE-tago en St. Pölten

ALE aranĝos laŭ invito de la gek-doj en St. Pölten verŝajne dum la monato de Majo ALE-tagon. Ni preparos bonan programon, kiun vi legos en la venonta Revuo. Krome per speciala invitilo ni komunikos informojn al la E-grupoj.

Muzikistoj!

ALE serĉas kelkajn Vienajn gek-dojn kun muzikinstrumentoj k kantemulojn. Anoncu vin ĉe ALE.

Donacoj por ALE

Fine de la pasinta jaro ni dissendis al ĉiuj membroj de ALE 20 Bausteine por financigi la havigon de presmaŝino. Gis nun jenaj gek-doj donis por tiu celo jenan donacon:

Krautschneider Steffi S 50,—. Schwarz J. S 50,—, Balague A. S 40,—, Kral J. S 25,—. Zottl Anna S 15,—, Slivka R. S 15,—, Schertler W. S 14,—, Zöchling Hermine S 14,—. Ramschak J. S 12,—, Hütter J. S 12,—, po ŝil. 10,—: Ohrenberger F. kaj Marie, Haiderer F., Arbinger K., Göttlinger Frieda, Patek R., Krainer J., Wimmer F., Hoschtalek J., Froidl W., Slezak J., Zakl Olga, Vokal E., Braun H., Schürrer K., Wirth L., Wehse G., Chuchel F., Loibel Marie, Käufel A., Heyni J., Ruedl, Leber, Kogler K., Steinbach L., Gaugitsch Hermine, Bitterle L., Holzer Fr., Jorde Marie, Neubauer Th., Schrom, Stöckl F., Berdan A., Huber A., Finkenzeller M., Loibel G., Brunner Grete, Schölmbauer, Dalamasl, Dr. Karner, po ŝil. 6,—: Marsänger J., Brettmaiser Helene, Hadt Berta. Spörk A. 5,—; Grabner A. ŝil. 1,—. (daurigota)

Katolika Esperanta Vivo

Adreso: Austria Katolika Ligo Esperantista (AKLE), sekretario Walter Mudrak, Wien III., Beatrixgasse 19/9, Austrio

Vienaj katolikaj Esperantistoj

regule kunvenas ĉiun duan kaj kvaran mardon en la monato inter la 17—19 h. I., Graben 1/II/25, Kreuzbundheim. — Kurso por komencantoj samloke ĉiumarde de 19—20,15 h.

P. Modesto Carolfi, O. F. M.

oficiala lektoro de Esperanto ĉe la instituto Pontificio Ateneo Antoniano, Romo, Via Merulana 124, gvidas E-kursojn por katolikaj instruistoj kaj monahinej-instruistinoj kaj por skoltoj. Li ankaŭ sukcesis enkonduki Esperanton ĉe la komitato por la Sankta Jaro 1950.

Nekrologo

Nur nun ni sciiĝis pri la morto de s-ano Richard Huber-Muff en Majo 1948 en Luzern, Svislando. La mortinto estis fervora, oferema katolika Esperantisto kaj pacbatalanto. Vienajn kat. s-anojn li karite helpis dum la lastaj jaroj. Nia danko esprimiĝu en nia preĝado por la mortinto. Al liaj kara vidvino kaj gefiloj, inter ili du pastroj, ni certigas nian plej sinceran kunsenton kaj kondolencon. — AKLE.

Multlingvisto nuntempa

Prof. d-ro Hermann Stieglecker en la monahejo St. Florian apud Linz, Supra-

Aŭstrio, festis fine de Julio sian 40 jaran jubileon de sacerdoto en St. Florian. Li estas prof. de la biblia studado pri la malnova testamento, bonfama sciencisto kaj maloftega, eksterordinara genio prilingva. Prof. Stieglecker scipovas 60 diversajn lingvojn el Eŭropo, Hindujo, Cinujo, Japanujo kaj ĉiujn lingvojn orientajn necesajn por la scienco biblia. Eminente li estras la latinan kaj grekan lingvojn. Per tio kardinalo Mezzofanti kaj la fama pastro prof. d-ro Ignaz Mitterrutzer en Innsbruck estas superitaj; ili scipovis „nur" 50, resp. 23 lingvojn.

Cetere la 1925 en Graz mortinta s-ano d-ro Heinrich Haas, advokato en Marburg ĉe la Dravo ankaŭ posedis 23 lingvojn. Tamen li ankaŭ lernis kaj ŝategis nian karan Esperanton.

D-ro A. Halbedl.

E-Instituto „Malnova Turo", Eindhofen, Nederlando

eldonis karton form. 18×25 cm kun E-teksto de la preĝoj „Patro nia", „Salu-ton Mario" kaj la preĝo unue dirita de Nia Sinjorino de Fatima. Bona kaj inda aperaĵo, kiu nur havas bedaŭrindan mankon, ke la nomitaj preĝtekstoj denove estas alivortaj ol la jam oficiale interkonsentitaj tekstoj laŭ la latina originalo. Pri tio regu unueco, al kiu ni pro katolika disciplino submetiĝu. Tiaj ni publikigas sube la aŭtentikajn, oficialigitajn preĝtekstojn:

PATRO NIA, kiu estas en la ĉieloj, sanktigita estu nomo via. Alvenu regno via. Fariĝu volo via kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero. Panon nian ĉiutagan donu al ni hodiaŭ. Kaj pardonu al ni ofendojn niajn, kiel ankaŭ ni pardonas al ofendintoj niaj. Kaj ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin de la malbono. Amen.

SALUTON, MARIO, gracoplena, la Sinjoro estas kun vi: benata vi estas inter la virinoj kaj benata estas la frukto de via ventro, Jesuo. Sankta Mario, Patrino de Dio, preĝu por ni pekuloj, nun kaj en la horo de nia morto. Amen. W. Mudrak, Wien.

Internacia ESPERANTO-MOVADO

Akademio de Esperanto

(Adreso: Oostduinlaan 32, Hago, Nederlando)

Oficialaj informoj de la Akademio de Esperanto

La dua mondmilito, kiu kaŭzis tiom da malordo, precipe en internaciaj aferoj, tute malebligis la funkciadon de niaj Lingvaj Institucioj„ la „Lingva Komitato" kaj ĝia „Akademio", dum longa tempo.

Kiam post la milito ni rekolektis niajn fortojn kaj klopodis refunkciigi la Lingvan Komitaton, la momento ŝajnis oportuna por konsideri, ĉu ni devas rekomenci nian laboron en precize la sama formo kiel antaŭ la milito, aŭ ĉu ni devas apliki reorganizon, same kiel tio okazis en tiel multaj fakoj de la socia vivo.

La sufiĉe granda amplesko de la Lingva Komitato kaj Akademio en la pasinteco ofte montriĝis malpraktikaj kaj el tio naskiĝis la ideo anstataŭigi la du komitatojn per unu sola kun malpi granda nombro da membroj. La fakto, ke la Lingva Komitato dum la milito perdis proksimume la duonon de siaj membroj, faciligis la vojon al tia decido. La rezulto de diskutoj kaj voĉdonado inter la restantaj membroj de la Lingva Komitato estas, ke nova statuto estas akceptita, kiu reformas la Lingvajn Institucioin kaj lasas nur unu komitaton de proksimume 40 membroj kun la nomo AKADEMIO DE ESPERANTO.

Tiu Akademio de Esperanto do de nun anstataŭas la ĝisnunan Lingvan Komitaton kaj ĝian Akademion kaj transprenas kaj daŭrigas iliajn taskojn. La ĉi kune publikigata nova Statuto donas ĉiujn detalojn pri la nova organizaĵo, kiu ebligos pli simplan kaj pli rapidan laboron ol la antaŭaj.

Ir. J. R. G. Isbrucker, Prezidanto.

(Rimarkigo de la redakcio: Pro la amplekso de la 30 paragrafa Statuto de la Akademio ni ne povis aperigi ĝin pro manko de loko.)

34-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Bournemouth, Anglujo, de 6.—13. 8. 1949. Konciza ekstrakto el la oficiala bulteno: Leteradreso: 34-a Universala Kongreso des Esperanto, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo. Kongresejo: Urbdomo de Bournemouth. Kongreskotizo: 35 angl. ŝil. ĝis la 31. 3. 1949, poste 40 ŝil. Aliĝiloj estas haveblaj ĉe la landaj E-asocioj. Informoj nur kontraŭ resp. kup. Limigo: Aliĝoj post la 1. 7. 1949 ne plu povas esti akceptataj.

Aŭstriaj partoprenemuloj tuj ankaŭ anoncu sin ĉe la E-Centro, Wien I., Neutorgasse 9, pro havigo de vizoj.

Informservo de UEA

Raportistoj en ĉiuj landoj estas serĉataj pri sialandaj novaĵoj en ĉiuj kampoj. Anoncoj ĉe Centra Oficejo de UEA, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

Internacia Federacio Esperanta Fervojista

okazigos sian unuan kongreson en Aarhus, Danlando, la 22.—27. 5. 1949 kun jena programo: 21. 5.: Interkonatiĝa vespero. 22. 5.: Malfermo de la kongreso. 23.—24. 5.: Kunsidoj kaj ĝenerala kunveno de IFEF. 25.—27. 5.: Festoj kaj ekskursoj. Kongreskotizo: 15 dan. kr. Aliĝiloj kaj informoj: Johs. Christofferson, Hallssti 43, Aarhus, Danlando.

Germana Esperanto-Kongreso 1949 okazos pentekoste (3.—7. 6. 1949) en Göttingen. Kongreskotizoj: plenaĝuloj DM 10,—, geedzaj paroj 12,—, gejunuloj sub 21 j. 5,—. Post la 31. 3. 49 por ĉiu persono 15,—. Aliĝadreso: E-grupo Göttingen, (20), Kreuzbergring 22, Göttingen, Germanujo. — Partoprenemuloj el Aŭstrio krome anoncu sin tuj ĉe la E-Centro Wien I., Neutorgasse 9, pro ĝustatempa ordigo de la necesaj formalaĵoj ĉe kompetentaj instancoj. Informoj nur kontraŭ reafranko.

Donacu por germana Esperanto-ekspozicio

Por ekspozicio dum la Germana E-Kongreso 1949 estas urĝe bezonata ĉiuspeca materialo el tutmondo. La ekspozicio eble fariĝos daŭra institucio en Germanujo. Tial ĉiuj ges-anoj ĉiulande estas petataj sendi Esperantaĵojn, kiuj estos grava helpo, al s-ro Heine Köhne, (20), Göttingen, Engelsberg 14, Germanujo.

Radio München, Germanujo

Sendado de E-kurso, 405 kaj 48,70 m. Ankaŭ Nürnberg 315,8 m ĉiun duan sabaton de 14,00—14,15 h. MET. Ripetado de la E-kurso ĉiun duan merkredon de 6,45—7,00 h. MET per la samaj ondoj. Alskriboj ĉiaspecaj estas bonvenaj al Radio München, (13b), München 2, Rundfunkplatz 1.

Radio Sofio

ŝanĝis la ondlongon kaj nun sendas E-lingvan programon ĉiumarde kaj ĉiuvendrede je la 20 h. (21 orienttempa) per mallonga ondo 39,11 m. Skribu pri viaj impresoj al Radio Sofio, Esperanto-emisio, Sofio, Bulgarujo.

Donaco de EANA al finnlanda Esperantistaro

Laŭ raporto de „Esperanta Finnlando“ la ĝenerala sekretario de la E-Asocio de Nord-Ameriko, G. A. Connor, nome de la usonaj ges-anoj donacis al la Esperantistaro finnlanda matricojn por la esperantaj supersignitaj tipoj, uzeblajn en la presejo, pro kio la organo nun povas esti presata laŭ la ĝusta ortografio Esperanta.

Ekspozicio pri infanaj desegnoj

Nederlandoj volos organizi helpe de Esperanto ekspozicion de infanaj desegnoj el tutmondo en Amsterdam. La ekspozicio estu granda propagando por nia movado. Infanajn desegnojn, internaciajn interlernejajn korespondaĵojn kaj aliajn esperantaĵojn bonvolu plej baldaŭ sendi al s-ro C. Geurts, lernejestro en Edamo, Nederlando.

Dana Aertafika Kompanio, D. D. L.

eldonis broŝureton en Esperanto, kiu estas havebla senpage ĉe Det Danske Luftfartselskab A/S Reklameafdelingen, Store Kongensgade 29, Kobenhavn K, Danlando.

Aleksandria Esperanto-grupo

(adreso: PK. 169, Aleksandrio, Egyptujo) direktis en Decembro 1948 leteron al la kongresanoj de UNESCO petante ilin, ke ili akceptu Esperanton por siaj kongresoj, kiun jam en 1925 la Ligo de Nacioj rekomendis instrui en la lernejoj tutmonde.

Rusa lingvo — nova mondlingvo?

Laŭ komuniko de s-ano okazis la 9. 1. 1949 tagmeze parolado ĉe Radio Wien en la kadro de soveta gazetarservo, en kiu la parolanto inter alie ankaŭ tuŝis la problemon de mondlingvo. Li diris, ke neniam la angla lingvo povos fariĝi mondlingvo, ĉar ĝi nur estas la lingvo de la komercistoj. La estonta universala lingvo estos la r u s a, kaj venos la tempo, kiam sciencistoj hontos ne scii la rusan lingvon, la lingvon de la socialismo.

Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko

Laŭ decido 128 de la ĝenerala kunsido de la Nacia Konsilantaro de Statistiko (B. I. G. S.) de 19. 7. 1939 la studado de Esperanto estas deviga lernobjekto por statistikistoj en Rio de Janeiro. Okaze de la lasta ĝenerakunsido de la Konsilantaro oni petis per la decido 400 al UNO, ke ĝi enkonduku Esperanton kiel helplingvon por publikaĵoj de UNO. Tri statistikaj resumoj pri Brazilo en Esperanto jam estas eldonitaj de B. I. G. S.

Internacia Muzikfesto en Llangollen

okazos de la 14.—19. 6. 1949 kun ampleksa programo. La pasintjaran feston vizitis 70.000 personoj. Unu el la vicprezidantoj estis la aŭstria instruministro d-ro Felix Hurdes. La aranĝkomitato eldonis ankaŭ Esperantlingvan prospekton kun la aliĝkondiĉoj kaj uzas Esperanton en sia korespondado. Informoj ĉe: Esperantosekretariino Ponciau, Wrexham, North-Wales, Anglujo.

Infanaj E-lernantoj

estas petataj kontakti kun lernejanoj de Urugvajo. Ili korespondas, interŝanĝas lernejajn gazetojn kaj serĉas junajn geamikojn ĉiulande. Skribiu al: „Companeros", calle Canelones, 1122, Montevideo, Urugvajo (Uruguay).

Esperanto-Staatsprüfungen

Die Prüfungen für das Lehramt und den Nachweis der Kenntnis des Esperanto beginnen am 9. Mai 1949 um 8 Uhr früh mit der schriftlichen Prüfung im Gebäude der Bundeslehrerbildungsanstalt in Wien I., Hegelgasse 12, und werden an den folgenden Tagen fortgesetzt. Die Zeit der praktischen und mündlichen Prüfung wird den Prüfungswerbern einzeln bekanntgegeben. Die nach § 4 der Prüfungsvorschrift belegten und mit einem 2 S-Stempel versehenen Gesuche um Zulassung zu den Prüfungen (Beilagen außer der Literaturliste 50 g-Stempel) sind bis längstens 25. April 1949 bei der Direktion der Prüfungskommission in Wien I., Minoritenplatz 5 (Bundesministerium für Unterricht), einzubringen. Die Prüfungsgebühr von 30 S für die Lehramts-, bzw. 15 S für die Kenntnisprüfung ist vor Beginn der schriftlichen Prüfung im Prüfungsraume zu erlegen.

Ein Verzeichnis der zur Vorbereitung für die Prüfung empfohlenen Werke samt der Prüfungsvorschrift und genauer Angabe der Prüfungsanforderungen ist vom Österreichischen Bundesverlag in Wien I., Schwarzenbergstr. 5, zu beziehen.

Vbb (Zl. 3216/1947)

Bibliografio

Monda Tribuno

Internacia ilustr. gazeto por kulturo, literaturo, scienco kaj tekniko, estis eldonita en Januaro 1949 de G. Katzianka. Redakcio kaj administracio Wien IX., Rossauerlände 27, Aŭstrio. Formato kaj amplekso kiel „Heroldo de Esperanto". Abonkotizo por 12 numeroj jare 2 us. dol. aŭ egalvaloro. — La gazeto ne celas servi al organizaj aferoj de la Esperanto-movado, sed volas esti E-jurnalo por kampoj supre indikitaj, kaj diskonigi la rezultojn de la kulturprogresoj tra la internacia Esperanta-publiko. La unuaj numeroj estas sufiĉe interesaj kaj ni deziras al la novnaskita gazetinfano, ke ĝi floru kaj prosperu. Provnumero havebla kontraŭ 1 resp. kup.

La gajaj edzinoj de Windsor

Komedio en kvin aktoj de William Shakespeare, el la angla originalo esperantigita de Stephan A. Andrew. Broŝ., form. 18×12, 90 pĝ., prezo 3 angl. ŝil. 6 p. Aĉetebla pogrande ĉe The Esperanto Publishing Co. Ltd., Rickmansworth, Herts., Anglujo, podetale ĉe la enlanda libroservo. — La libreto apartenas kiel la antaŭaj tradukaĵoj de la sama aŭtoro al la plej bona E-literaturo.

Fabloj de Jean de La Fontaine

Tradukita de Lucien Thevenin, la libreto kun 82 pĝ. en poŝformato estas eldonita de „Kompreni", 41 Rue des Tables Chlaudiennes, Lyon, Francujo. — El la ampleska fablaro, verkita de la fama franca klasikulo, la aŭtoro elektis 66 kaj prezentas ilin al la Esperantista legantaro, el kiu certe multaj trovos spiritan ĝuon je ĉi tiuj versformaj fabloj. Prezo: 100 ffr. aŭ 7 int. resp. kup.

Konstitucio de ČSR

Poŝforma broŝureto kun 72 pĝ. el la ĉeha Esperantigita de Jaroslav Mařik, eldonita de la Instituto de Esperanto-Servo en Praha II., Malů Stèpanská 7, Cehoslovakujo, kiu ankaŭ eldonas plaĉe presitan kaj ilustritan „Esperanto-Servon", Aktuala Informa Bulteno de Praha. — La enhavo de la „Esperanto-Servo" estas tendenca laŭ la reĝimo, sed la fakto, ke oni uzas ankaŭ Esperanton por la oficiala propagando, estas grava kaj la traduko de la ŝtata Konstitucio en Esperanton per si mem tre laŭdinda.

Eigentümer und Herausgeber: Österreichischer Esperantisten-Verband. Verlag: Tramondo. — Verantwortlicher Redakteur: Alfred Berdan, sämtliche Wien I., Neutorgasse 9. — Druck: Holzwarth & Berger, Wien I., Börseplatz 6. — Papierzuweisung 101/48/4-5, Bezugscheinnummer 61/86.